

JARO 2017

Estimataj membroj de edukado.net, subtenantoj de la paĝaro, Sube vi povas legi la raporton pri la jaro 2017 pri la laboro kaj financaj aferoj de la Fondaĵo edukado.net. Ni esperas, ke la raporto kaj niaj rezultoj kontentigos vin kaj vi daŭre sekvos nian laboron.

I. ATINGAĴOJ KAJ ARANĜOJ EN 2017

04-11 februaro:	Pollando, Poznan, UAM – trejnado
12-14 februaro	Pollando, Nowy-Sacz, Panteona balo
03-05 marto:	Nederlando, Studsemajnfino
09-15 aprilo:	Francio, Kvinpetalo, TAP-kurso
24-29 majo:	Svislando, Les Brenetes, AMO-seminario
10 ^a de junio:	Nederlando, Hago, 6 ^a Tutmonda Ekzameno
30a de junio ĝis la 03a de julio -	Usono - Raleigh - Landa kongreso (prelegoj, KER-ekzameno)
04a de julio ĝis la 13a de julio -	Usono - Raleigh - NASK-kursaro (kurso, KER-ekzameno)
15a de julio - ĝis la 22a de julio -	Sud-Koreio - Busan - ILEI-konferenco (Metodika seminario)
22a de julio ĝis la 29a de julio -	Sud-Koreio - Seulo - UK (kursoj, prelegoj, KER-sesio)
16-23 sept.	Pollando – Poznan UAM
24 sept. – 01a de okt. :	Germanio, Sieber, ERASMUS+ , lingvokursoj
15 ^a de decembro	Nederlando, Hago, Pola Ambassadejo – Zamenhof-festo – Fulmleciono

I.1 Kursoj, trejnadaj

Nia redaktoro, Katalin Kovats kaj ŝia edzo, estrarano de la Fondaĵo Edukado.net dum la jaro 2017 okazigis plurajn ĉeestajn lingvokursojn kaj trejnadojn, en pluraj landoj de tri kontinentoj.

- En februaro Katalin en Poznan gvidis instruistajn trejnadojn
- En marto Katalin gvidis lingvokurson kaj prelegis en la studsemajnfino de la nederlanda Esperanto-Asocio, en Steensbeek <https://edukado.net/novajhoj?id=689>
- En la svisa Les Brenets printempe Katalin, kunlabore kun ILEI, gvidis metodikan trejnseminaron kadre de AMO-seminario
- En la franca Esperanto-Centro Kvinpetalo Katalin gvidis TAP-seminaron en aprilo <https://edukado.net/biblioteko/dosierujo?id=273>
- En Koreio unue en Busan, dum la ILEI-konferenco ili okazigis lingvokursojn kaj trejnadojn por instruistoj
- Poste dum UK ili gvidis paroligajn kursojn je du niveloj, okazigis la KER-ekzamenojn
- Katalin partoprenis, prelegis kaj ekzamenis en la Usona Landa Kongreso en Raleigh
- Ili ambaŭ instruis dum somera kursaro de NASK en Raleigh, kie Katalin okazigis ankaŭ KER-sesion
- En septembro Katalin vojaĝis al la pola Poznan por partopreni per prelego la jubilean simpozion dediĉitan al la 20-jara funkciado de la Interlingvistikaj Studoj kaj samsemajne ŝi helpis en la lanĉado de la nova studgrupo de la studoj.
- Kunlabore kun pola kaj germana partnergrupo, kadre de la eŭropunia programo ERASMUS+ Katalin kaj Sylvain gvidis kursojn en la germana Herzberg/Sieber
- Katalin kontribuis al la lingvokursa programo de la nederlanda studsemajnfino (marto) <https://edukado.net/novajhoj?id=699>
- Grandsukcesa fulmleciono en la pola ambasadejo de Hago okaze de la Zamenhof-festo <https://edukado.net/novajhoj?id=725>
- daŭre okazis retaj trejnadaj kadre de RITE kaj kreiĝis nova formulo kunlabore kun ILEI
- Povas ŝajni privata afero, tamen menciindas, ke nia redaktoro ankaŭ ĉi-jare, kiel jam de kvar jaroj flegas en Hago konatan esperantiston, Mila van der Horst-Kolinska, nian iaman regulan subtenanton kaj sponsoron, restintan sola, sen parenca helpo kaj sen movkapablo.

I.2. Aliaj agadoj

Ĉi-sube vi trovas liston pri la plej gravaj agadoj kaj taskoj, kiujn nia teamo efektivigis dum la jaro 2017. La menciitaj aranĝoj kaj produktoj plej ofte estos raportitaj ankaŭ pli detale kaj/aŭ vi trovas ligon al detalaj raportoj en la paĝaro mem.

- Organizado kaj efektivigo de la Sesa Tutmonda Ekzamentago, (aprilo-majo 2017, kun 116 sukcesintoj en 2+15 lokoj de deko da landoj). Dum la tuta jaro sukcese ekzameniĝis el 197 aliĝintoj entute 161personoj. <https://edukado.net/novajhjoj?id=729>
- Gvidado de la laboro de la UEA ekzamena Komisiono
- Kunlaboro kun ILEI: partopreno en la kongreso en Busan, lanĉo de novaj projektoj pri lerniloj kaj subteno de la varbkampanjo por Juna Amiko kaj IPR (Abonantoj de ambaŭ havos aliron al la instrumaterialoj de edukado.net).
- UK¹ – SEULO
 - paroligaj kursoj pri Esperanto en du niveloj, sume en 16 lecionoj, tage por po 150 personoj;
 - seminario dum la KLERIGA lundo pri trejnado de geonkloj, prezento de la KER-ekzamenoj
 - prelego dum la Tago de Lernejo pri Ekparolu!;
 - organizado kaj gvidado de la kongresaj KER-ekzamenoj.
- Poznan: edukado.net varbos partoprenantojn por la novaj kursoj kaj Interlingvistikaj Studoj, ĝi daŭrigos la kampanjon por trovi subvencimonon por la kursanoj de Poznan kaj ene de la sistemo de RITE kaj KLERIGEJO donos kaj prizorgos studspacon por la kursanoj.
- Post unujara prepariĝo la 4an de januaro ni lanĉis la programon EKPAROLU!.
- Multterena varbado por **Ekparolu!**, prelegoj, reklamoj, filmoj, anoncoj, artikoloj.
- Kampanjo por registri kursojn en la KURSEJO (en la lastaj tri monatoj de la jaro ekestis pli ol 100 novaj registraĵoj)
- Kolekto de informoj kaj enpanteonigo de 22 novaj premiitaj instruistoj de Esperanto kaj prezento de deko da pliaj panteonanoj. <https://edukado.net/novajhjoj?id=724>
- La redaktoro estis invitata partopteni en Pollando la Panteonan balon, okaze de tio, ke 4 polaj kolegoj eniris la Pateonon <https://edukado.net/novajhjoj?t=2&id=682>
- Laŭ peto de ESF² kaj UEA³: gvidado de la stipendia komisiono por la studentoj de Poznan. Aktiva subteno de studentoj, sukcesa kolektado de *monhelpo* por la studentoj.
- Tutjara mastrumado de la RITE⁴-kursanoj, kies materialoj kaj produktoj riĉigas la retejan kolekton.
- Prelegoj/informado kaj varbado pri edukado.net: <http://edukado.net/novajhjoj?id=640>

Jen kiel la redaktoro sekvas la okazantajn Ekparolu-sesiojn!

Administrado de ĉiuj aktivaj sesioj Administra agendo

Tio videblas nur al la administrantoj Jen 20 unuaj aktivaj sesioj:

 Jeanneto - vaikuku 2018-03-21 19:00	 Jeanneto - Hoss 2018-03-22 17:00	 Don1980 - vaikuku 2018-03-22 18:30	 velttraet - heban14 2018-03-22 20:00	 Luule - rafaeln 2018-03-23 15:00
 fabiojvs - vaikuku 2018-03-24 10:30	 grand_dan - heban14 2018-03-24 14:00	 TotoStato - saiko 2018-03-24 16:00	 samxosko - anjo 2018-03-24 18:00	 lennat1924 - vaikuku 2018-03-24 18:30
 JasonMey - vaikuku 2018-03-24 19:00	 MarcWalsh - jwi 2018-03-24 19:30	 fabiojvs - heban14 2018-03-25 10:30	 Mikel - AndrePollock 2018-03-25 11:00	 falarodrigo - slavenuei 2018-03-25 16:00
 tonnievankessel - jwi 2018-03-27 13:30	 ChrisLewis - Mirekoteria 2018-03-27 21:00	 popo83 - gravuristo 2018-03-28 16:00	 krislo - jwi 2018-03-28 19:30	 ChrisLewis - Hoss 2018-03-28 22:00

¹ UK: *Universala Kongreso*

² ESF: *Esperantic Studies Foundation*

³ UEA: *Universala Esperanto-Asocio*

⁴ RITE: *Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net*


II. STATISTIKO PRI LA RETEJO

La paĝaro fine de 2017 havis entute 4909 membrojn, kiuj venas el 132 landoj.


Statistikon pri la lingvoniveloj, profesioj kaj aliaj detaloj pri la membroj vi povas trovi ĉi tie: <http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj>

II.1 Nur kelkaj ciferoj

Laŭ la mezuriloj inter julio 2009 kaj la fino de 2017 estis entute: 4909 membroj el 132 landoj (en 2016 ni havis 4480 membrojn.) La kresko estis ĉ. 450 novaj membroj, ĉar dum la jaro, pro duoblaĵoj kaj forpasoj, ni perdis kelkdekon da membroj. Eĉ tiel la pura kresko estas signife pli granda ol en la antaŭaj tri jaroj.



II.2. Membroj laŭ landoj



Jam de pluraj jaroj Francio estas je la pinto de la membrostatistiko. Ĝis decembro 2017 entute 680 (en 2017 aliĝis nur 36 novaj) francoj membriĝis kaj multaj el ili tre regule, preskaŭ ĉiutage, uzas la retejon. La ranglisto apenaŭ ŝanĝiĝis kompare al la du lastaj jaroj. Menciendas ke antaŭe RISKO portis novajn membrojn, en tiu ĉi jaro *EKPAROLU!* multe kontribuis al la nombrokresko.

Novajn anojn ni varbas dum kongresoj, ĉeestaj kursoj, artikoloj, kaj publikaĵoj en Facebook en diversaj grupoj kaj paĝoj, sed multe helpas ankaŭ jamaj membroj, kiuj proponas nian paĝon al konatoj kaj amikoj.

Vidu detalojn de la statistikaĵoj pri la uzantoj: <http://www.edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=uzantoj/>

II.3. Uzo de la ekzercoj en la sekcio Instrumaterialoj

<https://edukado.net/instrumaterialoj>

En la kolekto *Instrumaterialoj* estas entute: 8860 lerniloj, kiuj havis 114 959 elŝutojn kaj 2622 komentojn.

La elŝutnombro de lerniloj en 2017 kreskis kompare al la elŝutoj en 2016, kiam ni iusence fermis la elŝuteblojn por tiuj, kiuj ne registris kurson, ne estis kontribuantoj aŭ subtenantoj de la paĝaro. En 2017 kreskis la nombro de tiuj personoj, sed samtempe ni donis al kelkaj grupoj la uzrajton, ekzemple al la partoprenantoj de la Ekparolu-programo, al diversaj trejnitaj kaj kursanoj.

En la redaktejo kuŝas plurdekoj da ekzercoj, kiuj atendas redaktadon, kontrolon, enpaĝigon, sed tiujn taskojn la redaktoro ne sukcesis komplete plenumi. Estus bone trovi helpantojn por tiuj laboroj, ĉefe lingvaj kontroloj bonvenus. (Legu IV.9.)

II.4. Kampanjo por registrado de kursoj

<https://edukado.net/instrumaterialoj>

Pro tiu fakto, ke la sekcio *Instrumaterialoj* aŭtomate malfermiĝas por tiuj, kiuj registras siajn kursojn, la situacio de la kursoregistradoj de jaro al jaro pliboniĝas, tamen ne estas ankoraŭ tute komplota. Malgraŭ tio, ke kaj UEA kaj ILEI daŭre anoncas, ke la oficiala kaj la sola kursostatistiko troviĝas ĉe edukado.net ni ne havas kompletan trarigadon pri la kurso-situacio en la tuta mondo.

Elire de la kelktagaj kursoj ĝis la tutjaraj, de movadaj kaj lernejoj ni povas konstati ke ni regule havas ĉ. 80-90 registritajn movadajn kursojn kaj ĉ. 40-50 lernejajn registraĵojn.

En la arkivejo troviĝas pliaj neaktualaj registraĵoj: 758 movadaj kursoj kaj 500 finiĝintaj lernejaj kursoj.

Tiu arkivejo konservas la registraĵojn, eblas reserĉi kursojn, instruantojn kaj aliajn informojn. Espereble foje iu ŝatus serioze studi la fenomenon de Esperanto-kursoj en la mondo kaj en tiu situacio nia retejo povos doni valorajn informojn.

III. POPULARAJ EROJ, GRAVAJ TASKOJ

III.1. Risko <https://edukado.net/ludoj>



Tre populara parto de la retejo estas ankoraŭ la ludo RISKO. Tage ĉ. 80-90 personoj venas, eĉ plurfoje ensalutas en la retejon por ludi aŭ kontroli la rangliston.

Fine de 2017 ni havis precize 950 registritajn ludantojn.

Observeblas kresko de novaj ludantoj. Ili estis en 2017 entute 113. La novuloj aperas en la reto post surlokaj ludoj, kursoj, seminarioj kaj prelegoj. Por ne akriĝi la konkuradan sterĉon en 2017 ni ne plu aperigis regulajn anoncojn pri la gajnintoj, sed lasis ke oni ludu precipe por la akiro de konoj.


Daŭre funkciis ankoraŭ la deviga ripozperiodo, kiun la ludantoj atingis post 1000-taga ludo.

En januaro ni devis transporti ĉiujn fotojn kaj sondosierojn el Ipernity al nova reta deponejo, kaj krom tio ke tio donis grandan laboron, por kelkaj ludantoj ekestis malfacilaĵoj vidi kelkajn fotojn. Ties eraron ni ne sukcesis trovi, ĉar la problemo ne estas konstanta kaj klarigebla, sed nia programisto esploras la problemon.

La ludo en 2017 ekhavis plurcent novajn demandojn, jarfine ili estis pli ol 1500.

En 2018, okaze de la 5^a datreveno de la ludo, ni planas enkonduki novajn ludregulojn, laŭ kiuj ni devos adiaŭi ludantojn, kiuj ludis pli ol 1500 tagojn. Legu pri la planoj sub punkto IV.4.

Ludantoj laŭ landoj



El la 68 landoj en la unua pozicio Francio havas 143, en la sube montrata Britio havas 22 ludantojn.

Ludoj laŭ monatoj kaj jaroj

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2017	1405	1541	1684	1583	1645	1667	1534	1498	1611	1851	1723	1727	19469
2016	2687	2144	1981	1511	1527	1639	1471	1454	1354	1647	1573	1358	20346
2015	2448	2100	2344	2375	2349	2141	1937	2079	2445	2432	2368	2377	27395
2014	2352	2284	2344	2236	2167	2132	2226	2112	2164	2169	2289	2499	26974
2013	0	0	0	1550	2767	2415	2109	2189	2249	2490	2495	2426	20690

Ludantoj laŭ monatoj kaj jaroj

Jaroj	Monatoj												Entute
	jan	feb	mar	apr	maj	jun	jul	aŭg	sep	okt	nov	dec	
2017	94	111	100	108	109	105	115	104	111	112	101	106	1276
2016	165	150	118	94	103	110	112	105	106	103	97	91	1354
2015	136	118	140	163	139	126	121	121	150	130	130	132	1606
2014	149	138	125	153	142	127	131	122	137	133	147	160	1664
2013	0	0	0	290	216	168	149	145	150	149	161	154	1582

III.2. KER-ekzamenoj <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>



	Jaro: 2017 † Ordigi laŭ: landoj †									Poentoj*	Personoj
	B1			B2			C1				
	S	P	K	S	P	K	S	P	K		
1. Brazilo	4	0	0	0	1	1	2	0	2	30	10
2. Britujo	0	0	0	0	0	2	0	0	3	26	5
3. Bulgario	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
4. Ĉinujo	3	1	0	3	0	0	0	0	0	10	7
5. Danujo	0	0	0	1	0	0	0	0	1	8	2
6. Filipinoj	0	0	0	0	0	0	0	1	0	3	1
7. Francujo	6	1	2	1	0	2	4	0	2	45	18
8. Germanujo	2	0	3	0	0	0	3	0	6	53	14
9. Hispanujo	0	1	0	4	5	0	2	3	1	40	16
10. Indonezio	0	0	0	0	0	1	0	0	1	10	2
11. Irlando	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
12. Italujo	0	0	0	0	0	0	1	0	1	9	2
13. Japanujo	3	0	0	2	0	0	1	0	1	16	7
14. Kanado	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
15. Kazaĥujo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
16. Kolombio	8	0	0	1	0	0	2	0	0	16	11
17. Nederlando	0	0	0	0	0	2	0	0	2	20	4
18. Pollando	0	0	1	0	0	0	0	1	0	5	2
19. Rusujo	4	0	0	2	0	0	6	0	0	26	12
20. Serbuj	0	2	0	1	0	0	0	0	0	4	3
21. Sud-Koreujo	0	0	0	2	0	1	0	0	1	13	4
22. Svedujo	0	0	0	0	0	0	2	0	1	12	3
23. Svislando	3	0	0	1	0	2	0	0	0	13	6
24. Tajlando	0	0	0	1	0	0	0	0	0	2	1
25. Tajvano	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
26. Usono	1	0	2	3	0	0	2	3	13	104	24
27. Vjetnamujo	0	0	1	0	0	0	0	0	1	8	2
Entute	34	5	9	22	6	12	25	8	40		
	48			40			73			501	161

2017 estis laŭkalendare la deka ekzamenjaro en fine de kiu ni atingis sume 2012 sukcesintojn.

En 2017 okazis entute 5 memstaraj ekzamensesioj. Ni organizis la 6an tutmondan ekzamensesion en du partoj (la 10an kaj la 17an de junio) en 18 urboj de 14 landoj. En tiuj urboj ekzameniĝis entute 117 personoj kaj sukcesis 99. Poste ni havis apartan sesion dum la hispana landa kongreso en Teruel. Komence de julio okazis paralelaj sesioj en la usona urbo Raleigh, dum la landa kongreso kaj en Herzberg, Germanio. En julio ni okazigis plian sesion, same en Raleigh, dum la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kaj la lasta sesio estis dum UK en Seulo.

Al la ekzamenoj dum la jaro aliĝis entute 197 personoj, aperis en la ekzamenloko 181 kandidatoj (92 %) el kiuj sukcesis 161 personoj (89 %). La nombro de la fiaskintoj estis 20 (11 %).

<https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=kandidatoj>

En la lastaj du jaroj estis administraj problemoj inter UEA kaj edukado.net pro tio la ekzamena komisiono kun reprezentantoj de UEA kaj ESF havis kunsidon en Poznan en septembro 2017. La tiaman protokolon kaj ties enhavon la nove elektita Ĝenerala Direktoro de UEA, Martin Schaffer, serioze traktas kaj kune kun Katalin Kovats jam jarfine komencis labori pri la solvo de la antaŭaj problemoj. Ŝajnas ke la KER-ekzamenoj povos plu okazi sub la praktika organizado de edukado.net kaj kun la subteno de ESF.

La nomojn de la ekzamenitoj vi povas legi en nia FIERLISTO <http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>

KER-sukcesintoj en 71 landoj - ĝis jarfino 2017						
Ĝis 2017	Lando	Ekzamenoj	Ĝis 2017	Lando	Ekzamenoj	
1	Francio	504	37	Kroatio	1	
2	Brazilo	232	38	Kubo	14	
3	Rusio	146	39	Latvio	7	
4	Meksiko	108	40	Litovio	3	
5	Germanio	82	41	Luksemburgio	2	
6	Ĉinio	73	42	Madagaskaro	1	
7	Hispanio	72	43	Makedonio	3	
8	Sud-Koreio	70	44	Malajzio	5	
9	Usono	62	45	Meksiko	108	
10	Japanio	57	46	Mongolio	2	
11	Italio	54	47	Nederlando	45	
12	Svislando	50	48	Niĝerio	1	
13	Nederlando	45	49	Nikaragvo	17	
14	Kolombio	43	50	Norvegio	4	
15	Belgio	41	51	Nov-Kaledonio	1	
16	Pollando	40	52	Orienta Timoro	1	
17	Argentino	31	53	Pollando	40	
18	Finnlando	30	54	Portugalia	1	
19	Serbio	28	55	Rumanio	7	
20	Svedio	24	56	Rusio	146	
21	Danio	20	57	Serbio	28	
22	Britio	19	58	Singapuro	1	
23	Nikaragvo	17	59	Slovakio	10	
24	Kubo	14	60	Slovenio	4	
25	Hungario	12	61	Sud-Afriko	1	
26	Ĉeĥio	11	62	Sud-Koreio	70	
27	Vjetnamio	11	63	Svedio	24	
28	Slovakio	10	64	Svislando	50	
29	Kanado	9	65	Tajlando	1	
30	Latvio	7	66	Tajvano	3	
31	Rumanio	7	67	Ukrainio	3	
32	Indonezio	6	68	Urugvajo	1	
33	Aŭstralio	5	69	Usono	62	
34	Kazaĥio	5	70	Venezuelo	1	
35	Malajzio	5	71	Vjetnamio	11	
36	Norvegio	4				
Sume				2012		

III.3. Ekparolu! <https://edukado.net/ekparolu>

En 2017 Ekparolu! havis sian unuan oficialan jaron.

Antaŭe ni jam eksperimentis dum tuta jaro en 2016 kaj okazigis 150 prov-sesiojn, el kies spertoj ni konstruigis la programon. En la unua plena jaro, en 2017 niaj geonkloj gvidis 700 sesiojn. Verdire ni devis iom lukti ĝis la lasta horo de silvestro por alveni ĝuste al tiu nombro, sed fine ni sukcesis kaj tio ĝojigas nin ĉiujn. En la projekto partoprenis 103 genevoj kaj 58 geonkloj entute el 41 landoj. 35 genevoj finis siajn studojn ĉe ni kun 10, kelkfoje 20, kaj eĉ unufoje kun 30 sesioj. La enketiloj, kiujn ili plenigas post la studoj indikas al ni, ke la parolebloj, kiujn ni disponigas, estas vere utilaj kaj por multaj la solaj okazoj por ekzerci sin en la parolado

Niaj geonkloj, kiuj dediĉas multe da tempo por helpi la komencintojn meritas tre grandan dankon kaj aplaŭdon. Unu sesio daŭras 30 minutojn, sed kun ĉiuj prepariĝoj kaj administraj tre verŝajne unu sesio kostas al ili unu plenan horon. El la 58 ekzameniĝintaj kaj aprobitaj geonkloj 52 havis la oportunon doni parolsesion. El inter ili **Jean-Jacques Wintraecken el Nederlando, kun 68 parolsesioj estas la absoluta ĉampiono.**

Okaze de tiu rekordo li ricevis valoran librodonacon kaj pretiĝis intervjuo kun li kiun vi povas spekti klakante al la apuda foto.

En la jaro 2018 ni planas kelkajn programajn plibonigojn kaj pliajn, minimume 1000, novajn parolsesiojn! <https://edukado.net/novajhoj?id=727>



III.4. POZNAN: Interlingvistikaj Studoj



Edukado.net estas en laborkontakto kun la Interlingvistikaj Studoj en Poznan. Katalin Kováts jam de ĉ. 10 jaroj partoprenas en la tiea laboro, gvidas la metodikan preparon de la studentoj, en ĉiu tria jaro de la studoj. La retejo jam de pluraj jaroj donas spacon en la KLERIGEJO, kie la studentoj de IS povas sekvi siajn studojn kaj inter la konsultiĝoj povas labori helpe de edukado.net.

ESF⁵ (kunlabore kun UEA) krome taskis Katalin gvidi la komisionon, kiu respondecis pri la aljuĝoj kaj disdonado de la studstipendioj de ESF. Edukado.net ankaŭ en si mem lanĉis kolektadon de subvencioj por subteni la kursanojn en iliaj vojaĝ- kaj restadkostoj. Danke al tiuj kampanjoj kaj helpo de la membroj de edukado.net pluraj studentoj havis helpon. Tiun laboron K. Kováts daŭrigis ankaŭ en 2017, fakte ĝis la fino de la studoj de la nuna grupo. La studentoj kaj profesoroj daŭre povos uzi por la laboro ankaŭ la speciale kreitan IS-spacon en la KLERIGEJO. <http://www.edukado.net/helpu/poznan>.

En la tria jaro de la studoj la studentoj havis eblon elekti ankaŭ metodikan formadon, kaj kune kun ili ekde septembro 2016 al la metodikaj studoj povos aliĝi ankaŭ tiuj, kiuj volas nur **unuĵaran instruistan trejnadon** en Poznan, sub la gvido de Katalin Kováts. En la metodika grupo studis 4 personoj el la universitata grupo kaj aliĝis pliaj 14, el kiuj kelkaj profitis el la stipendio de ILEI.

En februaro estis la dua seminario de la instruista trejnado, kaj en septembro finekzameniĝis 4 kandidatoj. Pluraj ĉesis siajn studojn, kaj du kandidatoj prokrastis la defendon de la laboraĵo aŭ la finan ekzamenon. <https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=711>

III.5. Ĉeestaj kursoj kaj laboro dum UK

La agado de edukado.net disvolviĝas ĉefe en la reto, sed jare plurfoje okazas, ke la redaktoro gvidas kursojn kaj trejnadojn en Esperanto-aranĝoj. La plej granda tia elpaŝo estas jam de 15 jaroj la kutimaj programoj: "Paroligaj kursoj" dum la universalaj kongresoj. Katalin Kováts kaj ŝia edzo Sylvain Lelarge okazigas tre popularajn lingvokursojn dumkongrese. La dumlecionaj aktivaĵoj baziĝas sur la ekzercoj kaj materialoj de la paĝaro, kaj tiel la aranĝo estas bona okazo ne nur por lerni novajn esprimojn kaj akiri novajn spertojn, sed ankaŭ por instruistoj kaj klubgvidantoj partopreni aŭ almenaŭ observi la lecionojn. La kursoj okazas en du grupoj.



Por komencantoj estas dum 4 tagoj 8 sinsekvaj lecionoj. Tiuj, kiuj partoprenas ĉiun lecionon fine ricevas atestilon. Por mezniveluloj, la alia kurso, por kies partopreno necesas minimume A2-lingvonivelo, estas 4 diversaj renkontiĝoj. La du lecionoj de la sama tago pli-malpli identas.

Dumkongrese Katalin mem partoprenis ankaŭ en la programoj de la Akademio, kaj prelegis pri *Ekparolu!* dum la tago de la lernejo, aranĝo de ILEI. En la duhora programo de la Kleriga Lundo Katalin kaj Sylvain gvidis preparseesion al la KER-ekzamenoj.

KER-aferoj: deĵorado ĉe la KER-tablo dum la movada foiro, la organizado de la KER-ekzamenoj, aligo kaj informado de la personoj, surloka reĝisorado de la skribaj, laboratoriaj kaj parolaj sesioj, presado de la dokumentoj kaj testoj. La KER-organizado de la ekzamenoj faris Katalin Kovats, kunlaboris Sylvain Lelarge, kaj kontribuis pluraj ekzamenantaj kolegoj, inter kiuj menciendas Duncan Charters, kiel la plej aktiva en tiu laboro.

III.6. Programista laboro kaj kostoj

Komence de la jaro kaŭzis multe da kromaj laboroj la panika novaĵo, ke Ipernity fermiĝos. Ni ne volis atendi ĝis la lasta momento kaj riskigi nian populara RISKO-ludon, do necesis urĝe mane transloki ĉiujn sondosierojn kaj fotojn, kiujn ni lokis tien kaj kiujn nia paĝaro senŝarĝe publikigis pere de ligo al Ipernity. <https://edukado.net/novajhoj?t=2&id=675>

Kvankam la laboro kostis plurajn tagojn poste evidentiĝis, ke Ipernity plu funkcios. Ni tamen ne refaris la ligojn al la fotoj tie.


Danke al la nova kontrakto kun GAUS pri la nova gastejo de la servilo kaj la ĝisdatigo de la retejo, en 2017 ni apenaŭ havis paneon en la retservo. Kvankam la nova aranĝo kostos ĉ. 850 eŭrojn, ni renovigis la kontrakton ankaŭ por 2018. En 2017 ni farigis nur malgrandajn renovigojn kaj riparojn, ŝparante tiel sumon por pli grandaj laboroj en 2018. Ni devas analizigi la staton de la retejo kaj farigi la plej urĝajn novigojn por ke la paĝaro plu povu funkcii.

Kadre de la konstruado de Ekparolu! ni jam devis ŝanĝi plurajn detalojn en la retejo, por ke Ekparolu! entute povu funkcii.

III.7. Monkolekta kampanjo – Zamenhof-puzlo

Okaze de nia datreveno en decembro ni lanĉis monkolektan kampanjon, nun en la formo de vendado de puzlopecoj el la portreto de nia majstro. Por unu peco necesis pagi minimume 10 eŭrojn, sed estis subtenanto kiu donis 500 eŭrojn por unu puzlo. Entute estis 120 pecetoj, sed bedaŭrinde ni ne sukcesis vendi ĉiujn pecojn ĝis la jarfino kaj ili daŭre aĉetebblas. La fakton, kiu kiun pecon aĉetis blinde, ni sciigos nur tiam, kiam ĉiuj eroj vendiĝis. Subtenantoj, aĉetantoj ankoraŭ bonvenas. Vidu la detalojn kaj la liberajn numerojn ĉe <https://edukado.net/prie/datreveno/2017>

Tie ni indikas ankaŭ la pagmenierojn.



III.7. DANKON al la kunlaborantoj kaj al ESF

La redaktoro de edukado.net kore dankas ĉiujn, kiuj per informoj, materialoj kaj financaj kontribuoj helpis la laboron, per informado kaj varbado diskonigis la servojn de la paĝaro aŭ dum UK asistis en la kursoj kaj ekzamenoj. Aparta danko iru al **Mogens Rude Andersen** (Danio) pro la helpo en RISKO, al **Robert Bogenschneider** (Finnlando) pro la laboro en la panteonaj prezentoj, al **Víctor Solé** (Katalunio), **Mónika Molnár** (Svislando) kaj **Sylvain Lelarge** pro la diligenta korektado per la ruĝa krajono. Multe helpis ankaŭ **Peter Weide** (Danio) per provlegado de ekzercoj kaj kompreneble ĉiuj onkloj kaj onkloj, kiuj disponigis sesiojn por la komencintoj. Laŭdon meritas kelkaj el la studentoj de RITE, speciale **Patrick Morando** (Italio), kiu produktis multajn novajn materialojn, kiuj vicstaras por publikigo en la Dokumentujo kaj sekcio de Instrumaterialoj.

Aparta danko al ESF, <http://www.esperantic.org/en/home/> al la usona fondaĵo, kiu ne nur ĝiras ĉiumonate honorarion al la redaktoro, sed en 2017 ĝi donacis porteblan komputilon al Katalin por ebligi al ŝi senprobleman kaj altkvalitan laboron ankaŭ kiam ŝi vojaĝas kaj kursumas for de sia hejmo.



IV. PLANOJ POR LA JARO 2018

La ĉefaj agadoj en 2018 koncentriĝas ĉirkaŭ tri punktoj. Komenco de la rejunigo de nia retejo, kiu post 7-jara funkciado komencas kadukiĝi kaj kelkaj programpartoj havas la riskon baldaŭ ne plu funkcii bone. Alia kerna punkto estas la realigo de pluraj kunlaborprojektoj kun ILEI, precipe sur la kampo de trejnado de Esperanto-instruistoj. La tria ĉefa parto estos la kernaj ŝanĝoj en RISKO. Ni vidu la farendaĵojn iom pli detale.

IV.1. Teknikaĵoj pri la paĝaro

La lastaj grandaj transkonstruoj de la paĝaro efektiviĝis en 2011, antaŭ 7 jaroj. Tia periodo estas longa por retejo kaj multaj el la programoj eksmodiĝis. Por senproblema funkciigo de la servoj necesas gravaj intervenoj, ekz. transiro de PHP 5 versio al la 7^a, kaj multaj aliaj renovigoj. La novaj normoj de EU pri retumado kaj privateco postulas plurajn programajn kaj administrajn ŝanĝojn, aldonon de informoj pri privateco, kuketoj, sekureco de la retejo, ktp.

Ni ŝatus tiujn ŝanĝojn realigi en la nova jaro, kio evidente kostos kaj ŝarĝos nian buĝeton. Por scii ĝis kiu grado ni povas eniri en la planado, estus bone scii kiom da regulaj subtenontoj ni havos, je kiom da certa subteno ni povas kalkuli. Se ni enkondukos devigajn membrotizojn, ni perdos la favoran, sen-impot-devan statuson de ne-profitcela fondaĵo, do, tio ne estus bona solvo.

Tial ni kalkulas je la konsciaj kaj helpemaj membroj kaj petas tiujn, kiuj povas sin dediĉi al regula subteno, anoncu tion al la redaktoro. La ĝisnunaj tiutemaj informoj estas ĉe:

<http://edukado.net/prie/subteno/regulaj>

IV.2. Trejnadaj – eĉ pli intensa kunlaboro kun ILEI

- Jam en 2017 profundiĝis plurflanka kunlaboro kun ILEI kaj por 2018 ekestis kelkaj novaj komunaj projektoj. ILEI lanĉis tri intensajn trejnkursojn el kiuj fine realiĝos trejnado en Madrido dum la ILEI-kongreso kaj alia en Kotonuo, Benino. La esenco estas, ke Katalin Kovats kreis mallongigitan version de sia 100-leciana reta trejnkurso (RITE) kaj avantaĝpreze ebligis al la kursanoj aliĝi al ĝi. La novan 40-lecician kurson la partoprenantoj sekvas rete kaj devos fini ĝis la ĉeestaj eventoj. Poste en Madrido Katalin mem gvidos dum kvar tagoj intensan ĉeestan trejnadon kun ekzercoj, modellecionoj kaj ekzamenoj, kaj en Kotonuo en novembro Mireille Grosjean realigos similan programon. Por ambaŭ seminarioj aliĝis ĉ. po 10 personoj, kiuj laboras ekde decembro 2017.
- Por doni pliajn helpojn por la membroj de ILEI kaj stimuli ilin je abono de IPR kaj je Juna Amiko edukado.net oferas al tiuj “superaj membroj de ILEI” dum 2018 liberan aliron al la instrumaterialoj de la retejo. Ni esperas, ke per tio ni instigas la membrojn al pli riĉa kaj facila instrulaboro.
- En 2018 la RITE-kurso, lokita en edukado.net kaj manaĝita de Katalin Kovats, estos tutpreta kaj esperas havi novajn lernantojn kaj ankaŭ la unuajn kursfinintojn. La 100-leciana, tra ampleksa kursmaterialo kun ekzercoj kaj praktikaj partoj disponigas profesinivelan trejnadon de Esperanto-instruistoj.
- En la sekcio KLERIGEJO estos lanĉitaj pedagogicelaj filmetoj, kiuj celas diskonigi kelkajn artifikojn, trukojn por instrui Esperanton kaj elvoki diskutojn. La serion nutros filmetoj ne nur de Katalin Kovats, redaktoro, sed estos lanĉita ankaŭ konkurso kaj eblos sendi konkursaĵojn.
- Katalin Kovats instruos somere en NASK (Usono) kie dum la kursaro staĝos malgranda grupo da kandidatoj por observi la pedagogian laboron de la kursgvidantoj. Ili havos subtenon kaj gvidadon de Katalin.

IV.3. RISKO

<https://edukado.net/ludoj>

